

La Riverego

Somero de 2000

Esperanto-Societo Kebekia

N^{ro} 59, Jaro 15^a

La jaro 2000 estos por ni la jaro de la Kampanjo Eichholz

La Société québécoise d'espéranto a procédé, pour le compte de l'Association canadienne d'espéranto, à la collecte des livres entreposés chez l'imprimeur et lexicographe Rüdiger Eichholz, qui partait récemment à la retraite.

S-ro Rudiger Eichholz, membro de la Akademio de esperanto, translokiĝis pro emeritiĝo ĉi-printempe de Bailieboro al Cobourgh en Ontario.

Tiuj kiuj antaŭe vizitis lin, bone memoras lian grandegan domon kie vivis la familio kaj kie ĉiam estis libera spaco por pluraj gastoj. Gesinjoroj Eichholz multe laboris, verkis, eldonadis. Fakte, en ilia kelo troviĝis maŝinoj por presi, kunigi kaj bindi librojn. Ili laboris por eldonado de esperantaĵoj: revuoj Lumo kaj Alumeto kiel informbultenoj de Kanada Esperanto-Asocio (KEA), akademiaj studoj, Peko-teko, E-informiloj kaj flugfolioj. La vivo ŝanĝiĝis. La du filinoj nun laboras en grandaj urboj, la edzino mortis kaj tiu domo fariĝis multe tro granda por S-ro Eichholz.

La domo estis vendita kaj la filino Suna informis S-ron Wally du Temple, kasisto de KEA, ke ŝi volas donaci ĉiujn esperantaĵojn al KEA, kun peto ke oni venu transpreni la librojn meze de majo por ke la domo liberiĝu ĝis la fino de la monato laŭ peto de la aĉetinto. Wally petis nian helpon kaj Normando kaj mi ekvojaĝis Bailieboron la postan semajnon per granda luita kamiono. Kompreneble ke ĉio ŝajnis granda

aventuro kaj maltrankviligis min pro ŝoforado de tiom granda veturilo, pro tiom da farontaj kilometroj en nur du tagoj (pli ol 900 km). Sed ĉio estis bone organizita: kamiono, vetero, trafiko kaj ses horojn poste ni alvenis. Suna jam atendis nin, la libroj estis jam pakitaj kaj pretaj por pleniĝi la kamionon.

Ni "heredis" pli ol 1300 ekzemplerojn de la libro "Esperanto en la moderna mondo", centojn de "Life of Zamenhof", dekojn de multaj porinfanaj libroj, ktp...

Kvarope, la ŝarĝado finiĝis post du horoj kaj ni povis iom ripozi. Ĉirkaŭe estis belega naturo kun neforgesebla rigardo al la Riza Lago. Brila suno agrable varmigi nian dorson dum ni promenis

kaj elŝoveladis kelkajn plantojn. Suna estis kontenta kiam ŝi vidis ke pro grandeco de veturilo (4 m) eniris ĉio. Ŝi telefonis al patro kaj rakontis la novaĵon.

Ankaŭ Normando parolis kun li kaj promesis ke ni vizitos lin morgaŭan matenon. Estis agrabla, amika kaj ĝojiga revido. S-ro Eichholz estis feliĉa pro tiu renkontiĝo same kiel ni. Li feliĉis ankaŭ sciante ke ni bone traktos liajn esperantajn librojn en kiuj ja troviĝis granda plezuro, ĝojo kaj la vivo de Lanco (lia esperanta nomo).

En lia nuna, eta apartamento ĉirkaŭas lin daŭre tirkestaroj de Peko-teko, lia terminologia ŝatokupo. Li montris al ni la tre belan domon por pensiuloj rakontante al ni pri la nova vivo kaj ni kune promenis ĝis la lago Ontario malkovrante ĉarman urbeton Cobourgh. Ni promesis reviziti lin kaj diri, al esperantistoj kiuj loĝas proksime de Toronto, ke ili ankaŭ vizitu lin. Por Esperantistoj estas ĉiam feliĉige renkonti iun kiu parolas Esperanton, des pli kiam oni povas paroli pri tiom da temoj pri kiuj S-ro Eichholz interesiĝis.

Sekvo, paĝo 3

Somero de 2000. 1

JEFO urĝe bezonas korektantojn!

Karaj amikoj,

Mi estas Prezidanto de la Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO). Nia asocio prizorgas de kelkaj jaroj senpagan retkurson de Esperanto por franclingvanoj. (www.esperanto.org/jefo). De kelkaj tagoj tro abunde venas aliĝpetoj de kebekianoj por nia kurso (ni ne scias, de kie li ĉiuj venas... Ĉu eble de nia retpaĝaro?) La problemo estas, ke niaj korektantoj nuntempe jam estas troŝarĝitaj por prizorgi ilin.

Ĉu vi ne povus helpi nin trovi en Kanado aliajn korektantojn (do, kiuj havas retaliron kaj bone parolas la francan kaj Esperanton!). Tiel, ni povus akcepti ilin tuj.

Ĝis nun, la kursestro devis malpermesi la kurson por ĉiuj novuloj, ĉu francaj, ĉu kanadaj. Mi ne bezonas diri, ke estas sufiĉe grava kaj urĝa afero.

Kelkaj klarigoj pri la tasko de la korektanto: - Ŝli elektas mem, kiom da lernantoj ŝli volas (kutime nur 2 por la komenco kaj poste pli se ŝli pretas tion akcepti. Plie la nova korektanto rajtas helpo de sperta korektanto). - Ŝli ricevas la taskojn de la lernantoj retpoŝte. Ŝli devus unue koni la lecionon, kiun ŝlia lernanto ĵus faris

(vidu la ttt.ejon) kaj poste korekti la erarojn de la lernanto kaj sendi la korektitan taskon retpoŝte rekte al la lernanto.

Mi devas konfesi, ke en Francio, plejparte el niaj novaj membroj aliĝas tuj post tiu retkurso (pro la bonaj rilatoj kaj interŝanĝo de spertoj inter la

korektanto kaj la lernanto): estas do tute interesa afero ankaŭ por viaj asocioj.

Kore salutas vin,

Karine Texier

JEFO a un besoin urgent de correcteurs!

L'Organisation de la jeunesse espérantiste française (JEFO), qui gère le cours d'espéranto gratuit sur Internet, a récemment communiqué avec la Société québécoise d'espéranto pour demander la collaboration des espérantistes québécois.

C'est que JEFO est débordée de demandes d'internautes québécois qui souhaitent apprendre l'espéranto et que l'équipe de correcteurs français n'est pas en mesure de prendre tous ces "étudiants" en charge. Mais on ne voudrait tout de même pas les refuser! Voici quelques explications sur le rôle des correcteurs, qui doivent maîtriser l'espéranto et le français. Ils choisissent eux-mêmes le nombre

d'étudiants (normalement, deux pour commencer) et ils reçoivent les exercices des étudiants par courrier électronique. Pour effectuer la correction, en cas de doute, ils ont droit au concours d'un expert. Après avoir terminé la correction, ils renvoient le tout aux étudiants par courriel.

Et Karine Texier, de JEFO, termine sa lettre par une belle perspective: presque tous ceux qui terminent ce cours s'abonnent à leur association locale.

Appelez-nous!

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10\$. La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2000.09.15

Rédacteur en chef/Cefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collaboré à ce numéro/Kunlaboris al tiu ĉi numero Normand Fleury, Zdravka Metz kaj Sylvain Auclair (Korektado). Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prézidanto), Sylvain Auclair (vice-président/vicprezidanto), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario), Zdravka Metz (trésorière/kasistino), kaj Yvon Roux.

Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec)
H2G 2R8
Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151
LaRiverego@esperanto.nu
<http://www3.sympatico.ca/esperanto>

La jaro de la kampanjo Eichholz

Menciindas ke lia valora libro Bildvortaro estas unika kaj tre serĉata inter Esperantistoj. Ni menciuj ke ni ankaŭ "heredis" pli ol 1300 ekzemplerojn de la libro "Esperanto en la moderna mondo", centojn de "Life of Zamenhof", dekojn de multaj porinfanaj libroj. Ankaŭ la Libro-Servo de KEA ricevis plurajn interesajn titolojn: Tinĉjo, libro pri bestoj, Amuzo per scienco... Nia vojaĝo finiĝis, sed nun nia kelo estas plena kaj ni petas vian helpon. Kion fari kun la stoko de "Esperanto en la moderna mondo"? Ni ŝatus nomi la dissendadon de la libroj de S-ro Eichholz - la Kampanjo Eichholz. La libro estas valora: historie, informe kaj eduke, kaj ĝi estas dulingva: Esperanta kaj angla. Laŭ ni ĉiu biblioteko ĉu urba aŭ lerneja devus havi ĝin. Estu tiu kampanjo informcela

kaj ĉiu membro petu unu, du, aŭ kvin ekzemplerojn por donaci al instruistoj, ĵurnalistoj kaj kompreneble havu ĝin en propra biblioteko. Ĝi ja spegulas la E-movadon dum preskaŭ cent jaroj, parolas pri E-stratoj en la mondo, pri E-poŝtmarkoj eldonitaj de kiuj landoj kaj multe pli da interesaj informoj vi povas trovi. Vi povas havi ĝin senpage tamen, ni petas vin ke vi pagu sendokostojn. Ni ŝatus donaci ĝin al Esperantistoj loĝantaj en nepagipovaj landoj. Vi povas sendi ĝin al viaj korespondamikoj. Kostas ne multe pli sendi du-tri librojn kune. Ni jam ricevis unuan monan donacon de Halifaxo kaj mendo de 50 ekzempleroj. Ankaŭ Ken Price de Toronto jam mendis 75 kopiojn. Bonŝance ke ni ŝatas librojn ĉar nuntempe nia kelo aspektas kiel libro-deponejo. La biblioteko de Montreala

E-klubo pli ol duobliĝis ĉar S-ro Eichholz donacis sian E-bibliotekon. Unu plia laboro atendas: fari inventarion de la titoloj. Ĉu ne valora plano por la jaro 2000? Fine, ni kore dankas al S-ro Eichholz kaj ni esperas ke li vizitos nin. Samtempe li vidos kiom pli valoriĝis kluba biblioteko kaj eble relegos iun ŝatatan libron.

Zdravka Metz

Ĵurnalistoj denove interesiĝas pri Esperanto

Ĉu la jaro 2000 signifas malfermiĝon al la mondo? Ĉu kelkaj pensas ke venas tempo por Esperanto? Kial ĵurnalistoj denove telefonas al ni? Multaj konsciis pri tera vilaĝo sur kiu ni vivas, ni la homoj tiom similaj kaj parolantaj tiom da lingvoj, kiam la 31-an de decembro ĉie tra la mondo homoj havis eblecon vidi kiel oni festas la alvenon de nova jarmilo. Tio iom kvazaŭ sekurigis orienton kaj okcidenton ke neniu "fino" okazis. Simple estis 25-hora televida festo: muziko, ĝojo, piroteknikaĵoj, danco, strataj festoj kiuj abundis kun homoj. "Sed kial ĝis nun Esperanto ne sukcesis"?

Estas daŭra demando de ĉiuj ĵurnalistoj. Ankaŭ la du lastaj ĵurnalistoj de Radio-Canada same

demandis nin, sed prezentis tamen sufiĉe pozitive la lingvon. La unua ĵurnalistino prezentis la lingvon dum tri minutoj kadre de elsendo por gejunuloj en aprilo, montrante Tinĉjon kaj muzikgrupon TEAM' de Pollando. La dua elsendo estis meze de junio kaj komencis per titolo de la libro "Bestoj en nia domo", libro eldonita kaj verkita en Montrealo kaj en Esperanto. Joséphine Sans, ĵurnalistino de Francio ne parolas Esperanton, sed devenas de familio kie avo kaj patro uzis ĝin regule kaj ŝi ja promesis publike lerni kaj legi porinfanan libron.

Zdravka Metz

Rakontu viajn vojaĝojn aŭ viajn gastigadojn sur la reto!

Mi nuntempe estas serĉanta tekstojn de personoj, kiuj vojaĝis uzante Esperanton aŭ kiuj gastigis Esperantistojn de aliaj landoj pere de la Pasporta Servo, kadre de la finpretigado de la retpaĝaro de ESK.

Se vi volas rakonti pri viaj aventuroj aŭ kontaktoj kun eksterlandanoj, bonvolu sendi al mi vian tekston, kiu povas esti tiel longa (aŭ mallonga) kiel vi deziras.

Vi povas povas sendi ĝin poŝte al la adreso de ESK aŭ retpoŝte (mi preferus tion), al la adreso gajulo@hotmail.com.

Mi ankaŭ bonvenigas fotojn, poŝtkartojn, ktp. Ili povos aperi surrete apud via teksto.

Jessy LaPointe

Afrikanoj plendas pri manko da franclingvaj tradukoj

Des délégués de pays africains francophones se plaignent d'un manque important de traductions en français, dans le cadre de l'assemblée des Nations Unies sur les droits des femmes.

La delegitoj al la asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj (UN) pri la virinoj "Pekino+5" en Nov-Jorko konsentis pri pluraj rajtoj, kiuj devos esti akorditaj al la virinoj tra la mondo, koncernante ĉefe la sano.

Sed la delegitoj de la neestraraj organizoj (NEO) de la franclingvaj afrikaj landoj plendis pri "neĉeesto de traduko en la franclingvan de pluraj komunikaĵoj".

Dum du tagoj, tiuj NEO montris sian malakordo okaze de debatoj interafrikaj, kiuj okazis nur en la angla. Ili prezentis afiŝojn sur kiuj estis skribita "Afrique francophone

aussi!".

Tiuj NEO, kiuj timas la "margenigado, aŭ eĉ la eksigo" de la franclingvaj afrikaj NEO-j el la organizado kaj el la decidofaro al nivelo de la afrika grupo, "firme rekomendas la eldono de dokumentoj en la aliaj lingvoj samtempe kiel tiuj en la angla, kaj je taŭgaj kvantoj".

Ĝenerale, la oficialaj dokumentoj de la UN estas eldonataj tre rapide en la angla, sed la versiojn en la aliaj lingvoj oni havebligas tre poste.

(Laŭ AFP, 10-06-00)

Ah! le français...

On ne peut qu'admirer les efforts des gens pour s'exprimer en français. Toutefois, l'effet obtenu n'est malheureusement pas toujours celui escompté.

Dans un hôtel de Tokyo:
Est interdit de voler les serviettes de l'hôtel s'il vous plaît. Si vous n'êtes pas le genre de personne à faire une telle chose est, s'il vous plaît ne pas lire la notis.

Dans le lobby d'un hôtel de Bucarest:
L'ascenseur sera en réparation le prochain jour. Pendant ce temps, nous regrettons que vous soyez insupportables.

Dans un hôtel d'Athènes:
On s'attend à ce que les visiteurs se plaignent au bureau entre 9h et 11h A.M. tous les jours. Il y aura une Exhibition d'Arts de Moscou par 150 000 peintres et sculpteurs de la République slave. Ceux-ci ont été exécutés au cours des deux dernières années.

Dans un publicité d'un dentiste de Hong Kong: Dents extraites par les toutes dernières méthodistes.

Laŭ raporto de la komisiisto pri la oficialaj lingvoj

La angla: lingvo de la sportoj en Kanado

Malgraŭ gravaj progresoj dum la lastaj dek jaroj, la franclingvaj atletoj de Kanado povas pli malfacile kreskigi siajn talentojn ol la anglalingvanoj.

Gravaj mankoj al la dulingveco en la naciaj organizoj kaj ĉe la trejnistoj estas obstaklo por franclingvanoj, kiuj volas partopreni naciajn aŭ internaciajn ĉampionkonkursojn.

"Por sukcesegi en la plej altaj niveloj de la plimulto de la sportoj, la franclingvanaj atletoj devas regi la anglan, krom sian sporton. Krom tiu evidenta lingva malegaleco, tiu inverso en la prioritatoj povus malhavi al niaj naciaj teamoj talentajn atletojn", oni

povas legi en la unua versio de la raporto de la komisiisto al la oficialaj lingvoj de Kanado.

Konsiderante, ke laŭ la censo de 1996, 24,6% de la kanadanoj indikas la francan kiel sian unuan lingvon kaj 75,4% la anglan, la aŭtoroj de la raporto surpiziĝas, ke nur 18% de la altnivelaj atletoj kiuj ricevas rektan financan helpon de la kanada registaro estas franclingvanoj, kontraŭ 82% por la angla. Same, la franclingvanaj atletoj konstituis nur 18% de la kanadaj teamanoj, okaze de la Olimpiaj Ludoj de Nagano (1998) kaj Atlanta (1996).

Des athlètes francophones du Canada se voient encore restreindre l'accès à des compétitions mondiales en raison de leur "handicap" linguistique, malgré les nombreux progrès en ce sens au cours des dernières années.

Ĝenerala jara kunveno Assemblée générale annuelle General Annual Meeting

La Société québécoise d'espéranto tiendra son assemblée générale annuelle au restaurant *Le Commensal*, au coin des rues Saint-Denis et Laurier à Montréal, le 27 août 2000, à 10 heures du matin. Tous les membres en règle de la Société sont invités à y participer. Il y sera question des orientations que la Société entend prendre pour la prochaine année, du bilan financier 1999-2000 et de la composition du conseil d'administration 2000-2002.

La venonta ĝenerala jara kunveno de la Esperanto-Societo Kebekia okazos ĉe la restoracio *Le Commensal*, je la angulo de la stratoj Saint-Denis kaj Laurier en Montrealo, la 27-an de aŭgusto 2000, je la 10-a matene. Ĉiuj membroj de la Societo estas bonvenaj. Estos pridiskutataj la celoj de la Societo dum la venonta jaro, la financa raporto de 1999-2000 kaj la elekto de la estraranoj por 2000-2002.

The Quebec Esperanto Society will have its general annual assembly at *Le Commensal* restaurant, corner Saint-Denis and Laurier in Montreal, August 27th, 2000, at 10:00 AM. Every member of the Society is invited to take part. We will discuss the goals of the Society for the next year, the financial report for 1999-2000 and the composition of the board of directors for 2000-2002.

Ŝimon Peres Alta Protektanto de la 85-a UK

UEA informas, ke la israela politikisto Ŝimon Peres akceptis fariĝi Alta Protektanto de la 85-a Universala Kongreso en Tel-Avivo. Ŝimon Peres estis plurfoje ministro, interalie por eksterlandaj aferoj, kaj dufoje ĉefministro, kaj laŭreato de la Nobel-pacpremio en 1994.

La Tel-Aviva UK, rekonita de Unesko kiel Flagŝipa Evento de la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco, apenaŭ povus havi Altan Protektanton pli ligitan al la celoj de tiu Jaro kaj de ĉiu UK ol Ŝimon Peres. Li ja estas konata kiel unu el la arkitektoj de la pacprocezo en la regiono, kies loĝantojn tiom longe turmentis malamo

kaj perforto. Ne hazarde Peres estis kuniniciatinto de la Manifesto 2000 por la Kulturo de Paco kaj Senperforto, ĉar li mem fariĝis simbolo kaj modelo de sentima agado por anstataŭigi kulturon de perforto per kulturo de paco.

Same bone en Kroatio...

S-ro Stjepan Mesic, prezidento de la Kroata Respubliko, akceptis la inviton de UEA fariĝi Alta Protektanto de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Zagrebo en 2001.

Tiel ankaŭ la venontjara UK ĝuos la plej altan honoron, kiun povas doni la gastiganta lando.

Krom la Alta Protektanteco de la ŝtatestro, pri la prestiĝo de Esperanto en Kroatio atestas ankaŭ la multnombreco de eminentuloj de la kultura, scienca kaj politika vivo, kiuj akceptis membrecon en la Honora Komitato de la 86-a UK. Estas rimarkinde, ke ili ne nur principe simpatias kun la celoj de la UK, sed multaj el ili jam en antaŭaj okazoj donis konkretan apogon al Esperanto kaj al iniciatoj de Kroata Esperanto-Ligo. Ankaŭ la preparoj de la venontjara UK povis jam profiti de iliaj utilaj konsiloj.

Somero de 2000. 5

UEA eldonis lernolibron pri demokratio

Post "Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj" kaj "Paĉjo, kio estas rasismo?" UEA eldonis trian libron pri bazaj civitanaj scioj. La verko pri "Kio estas demokratio?" de la britaj profesoroj Davit Beetham kaj Kevin Boyle estas klara kaj facile komprenebla manlibro pri la esenco, celoj kaj praktika funkciado de demokratio, verkita laŭ komisiono de Unesko.

Simile al la pli frua libro pri homaj rajtoj, la lernolibro pri demokratio estas verkita en formo de 80 demandoj kaj respondoj. Ili estas aranĝitaj en ses sekcioj: bazaj konceptoj kaj principoj; liberaj kaj justaj elektoj; malferma kaj respondeca regado; rajtoj de unuopuloj; demokratia socio; la estonteco de demokratio.

Unuavice la libro celas kontentigi edukan bezonon en landoj, kiuj ĵus komencis enradikigi demokratiajn principojn kaj en kiuj ofte mankas

propra tradicio pri ilia praktikado. Tamen, ankaŭ al loĝantoj en landoj kun longaj demokratiaj tradicioj ĝi estas utila legaĵo, ĉar ĝi prezentas interesajn vidpunktojn pri problemoj, kiuj estas temoj de aktuala debato en multaj landoj. La aŭtoroj montras, ke demokratio ne estas unuforma, sed ofte eĉ tre malsamaj solvoj agadmanieroj povas esti aplikataj. Krom doni praktikajn respondojn al konkretaj demandoj, per sia kritika aliro la aŭtoroj instigas demokratian pensmanieron, por ke la leganto sciui orientiĝi ankaŭ en situacioj, kiuj ne estas traktitaj en la libro.

Kiel kutime ĉe eldonaĵoj de UEA, "Kio estas demokratio?" havas tre belan grafikan veston, i.a. pro spritaj ilustraĵoj de Plantu, ĉefdesegnisto de la franca ĵurnalo Le Monde.

KIO ESTAS DEMOKRATIO? 80 demandoj kaj respondoj. David

Beetham kaj Kevin Boyle. Ilus. Plantu. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA 2000. 143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Prezo: EŬR 9,90.

L'Association universelle d'espéranto lance un manuel sur la démocratie

Après "Droits de l'Homme: questions et réponses" et "Papa, qu'est-ce que le racisme?", l'Association universelle d'espéranto a publié un troisième livre sur les sciences sociales, grâce à la plume des professeurs britanniques Davit Beetham et Kevin Boyle, qui ont produit un manuel simple d'utilisation sur l'essence, les buts et la pratique de la démocratie.

Fariĝu kunposedanto de Esperanto-Domo!

Mi planas la konstruadon de Esperanto-Domo en suda Bavario. Por realigi la projekton mi nun serĉas Esperantistojn, kiuj volas fariĝi kunposedantoj de la Domo, aŭ aliforme kontribui al la realigo de la projekto.

La domo troviĝos en la regiono Pfaffenwinkel. Pfaffenwinkel estas konata pro siaj kulturaj vidindaĵoj (preĝejo Wieskirche, monaĥejo Wessobrunn ktp). kaj estas turisma regiono. Ĝi troviĝas meze inter la bavara ĉefurbo kaj ekonomia centro München kaj estas bone atingebla per aŭtomobilo kaj per trajno (linio München - Innsbruck).

En la Esperanto-Domo estos ejoj laŭ la deziro de la investemuloj, kiuj pagos

la realigon de la projekto. Se vi investas 150 eŭrojn vi povas fariĝi simbola posedanto de unu kvadrato de la Esperanto-Domo. Ek de 1500 eŭroj vi povas havi vian propran ĉambron.

Parton de la Esperanto-Domo aĉetos la entrepreno "lb linguistisches bureau gmbh" (mallonge lb-gmbh) kiu ofertas diversajn lingvo-rilatajn, oficejajn kaj peradajn servojn. La investo en la centro pro tio estas interesa ĉefe por entreprenoj ie en la mondo, kiuj volas havi "propran oficejon" en Germanio, ĉar lb-gmbh ofertas oficejajn servojn ankaŭ por eksterlandaj entreprenoj. Lb-gmbh utiligas por siaj internaciaj kontaktoj la germanan, la anglan, la francan kaj la internacian lingvon. (- kaj

de pluraj jaroj estas fidinda partnero de hungaria LINGVO-Studio, eldonanto de Eventoj kaj ret-info - ndlr)

Se vi interesiĝas pri la projekto, petu detalajn informojn aĉe:

Alfred Schubert lb-gmbh@t-online.de

Pf. 1539 DE-82355 Weilheim, Germanio Tel: +49-8809-1234

fonto: ret-info

Reten...

Iom da proverboj por pripenso

Ĉe <http://www.esperanto.se/> oni povas nun ricevi hazarde elektitan proverbon por pripenso. Je ĉiu klako al la butono "Proverbo survoje"; prezentigas nova proverbo el la kolekto de L. L. Zamehof. De la sama paĝo estas nun ankaŭ rekte atingeblaj la teksto de la Manifesto de Prago en multaj lingvoj kaj Upsala arkivo, kun i.a. La Sankta Biblio.

Franca kanzon' sur bretona KDisko

Se vi ŝatas aŭskulti francan muzikon, varietean kaj kanzon-stilan, tute en Esperanto, tiam vizitu la ttt-ejon <http://perso.club-internet.fr/jwaterk/esperl.htm>. Poste, sendu mesaĝon al Berto (bsn@aql.fr). Dua KDisko kun pli bona muziko kaj diversaj voĉoj nun estas preparata.

Esperanto-babilejo en Rusio

En Rusio finfine aperis reta E-babilejo. Bonvenon al <http://lendir.karelia.ru/chat/> Ĝi dume ne estas tre riĉa tamen oni esperas, ke vi helpos al vigligi ĝin

Nova provo establi Forumon por aziaj Esperantistoj

Lastatempe en Japanio troviĝas Forumo por Esperantistoj, al <http://web.kamogawa.ne.jp/~ichi/cgi/etreeBBS/>. Ĝojinde! Tamen la servanto-maŝino estas malrapida. Nun Solis en

Urumqi, Ĉinio pretas establi novan Forumon en esperanta versio de la Verda Reto, al <http://www.solis.163.net>. Oni esperas, ke li sukcesos.

Anekdotoj en Esperanto!!!

Estas kreita nova dissendolisto: esperanto.anekdot. Kiel eblas kompreni el la titolo, aboninte la dissendon vi povos regule LEGI kaj mem SENDI freŝajn (aŭ ne tro) anekdotojn, ŝercojn, spritajn frazojn, poemetojn, k.a. En la dissendo NE okazas diskutoj, sed nur anekdotumado. La listo estas malfermita por ĉiuj. Ĉiuj povas sendi mesaĝon al la listo, kiun tuj ricevos ĉiuj membroj de la dissendo. Por aboni sendu malplenan mesaĝon al esperanto.anekdot-subscribe@listbot.com. Por vidi la arkivon, rigardu ĉe <http://esperanto.anekdot.listbot.com>. Bonvenon al esperanto.anekdot!

Nova forumo

En la teknika prizorgo de Liu Xiaozhe (Solis) ekfunkciis nova, retpaĝa babilejo "Internacia Esperanto-Forumo" ĉe la adreso: <http://www.cineŭs.net/bbs/forumo/> Celo de la forumo estas interŝanĝi pensojn, informojn, kunĝui niajn sukcesojn kaj ĝojojn...

LibroServo de UEA sur la reto

La librokatalogo de UEA atingis la interreton. Ĉe la retadreso <http://www.uea.org/katalogo/>

www.uea.org/katalogo/ membroj kaj nemembroj povas serĉi inter la 4100 titoloj laŭ kategorio, titolo, aŭtoro, tradukinto kaj traduklingvo. Oni povas uzi la katalogon por mendoj, kiuj estos ekspedataj de la libroservo de UEA. La retkatalogo ne anstataŭigas la presitan katalogon. Nova versio de ĝi aperos en oktobro ĝijare, laŭ informo de la Centra Oficejo de UEA.

Kompleta katalogo de libroj, diskoj, kasedoj, videofilmoj, insignoj k.a. varoj vendataj de la Libroservo de UEA estas nun konsultebla en TTT ĉe <http://www.uea.org/katalogo>. Kun 4100 titoloj la sortimento estas senkompare la plej granda en Esperantujo.

En la reta katalogo oni povas serĉi librojn laŭ kategorio, titolo, aŭtoro, tradukinto kaj traduklingvo. Oni povas tre facile elekti la deziratajn varojn, kompili mendon kaj sendi ĝin al la Libroservo de UEA, kiu tuj plenumos ĝin.

La katalogo estas regule aktualigata, dum la libroforma katalogo, aperonta en oktobro, neeviteble iom post iom malaktualiĝos.

La enretigo de la katalogo estis teknike realigebla danke al la kompetenta volontula laboro de Michiel Meeuwissen el Nederlando.

Datumbazo pri lingvoj

Se vi interesiĝas pri lingvoj de la mondo kaj ŝatus kunkrei esperantlingvan datumbazon pri lingvoj en la reto vi estas bonvena aliĝi al lingvoj-diskutlisto ĉe www.egroups.com, sendu ajnan mesaĝon al tiu adreso: lingvoj-subscribe@egroups.com.

Somero de 2000. 7

Diru... Kio okazos?

26-a de junio ĝis la 14-a de julio. Nord-Amerika Somera Esperanto-Kursara (NASK), ĉe la San-Franciska ŝtata universitato (Usono).

5-a ĝis 9-a de julio. Kultura Arta Festivalo (KAFE), en Tuluzo (Francio).

17-a ĝis 23-a de julio. Kultura Esperanto-Festivalo, Finnlando.

25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. 85-a Universala Kongreso en Tel-Avivo (Israelo).

27-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto. Internacia Junulara Semajno (Hungario).

5-a ĝis 12-a de aŭgusto. 56-a Internacia Junulara Kongreso, en Hongkongo (Ĉinio).

7-a de oktobro. Internacia Ago-Tago.

15-a ĝis 21-a de aprilo 2001. Kvina Tutamerika Kongreso de Esperanto (Meksikio).

21-a ĝis 28-a de julio. 86-a Universala Kongreso, en Zagrebo (Kroatio).

Julio 2002. 87-a Universala Kongreso de Esperanto, en Fortaleza (Brazilo)

Ni organizas

13-a de aŭgusto. Pikniko en parko La Fontaine. Rendezvuo ĉe la enirejo de Théâtre de la Verdure. 17h.

Atentu!

Ne vi forgesu la venontan ĝeneralan jaran kunvenon de la Esperanto-Societo Kebekia, kiu okazos ĉe la restoracio Le Commensal, je la angulo de la stratoj Saint-Denis kaj Laurier en Montrealo, la 27-an de aŭgusto 2000, je la 10-a matene. Ĉiuj membroj de la Societo estas bonenaj. Estos pridiskutataj la celoj de la Societo dum la venonta jaro, la financa raporto de 1999-2000 kaj la elekto de la estraranoj por 2000-2001.

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj: (514) 272-0151 aŭ al LaRiverego@esperanto.nu.

Nova sekcio: Inter Ni

La estraro de ESK konstatis, ke estas pli kaj pli malfacile renkontigi esperantistojn, ĉar multaj havas rendevuplenajn taglibrojn aŭ loĝas for de la Esperanto-Domo en Montrealo. Ni ankaŭ ricevas multajn demandojn de kebekianoj en la regionoj kiuj volas korespondi aŭ renkonti kun samideanoj.

Vi baldaŭ rivevos vokon de ni por scii ĉu vi interesiĝas al la ideo, ke via nomo kaj adreso aŭ retpoŝtadreso aperu en *La Riverego*. Tiel, ni proponas al vi ilon por sciigi aliajn kebekianojn aŭ eksterlandanojn pri via deziro korespondadi aŭ renkonti samideanojn en via regiono.

Vi povas ankaŭ kontakti nin ĉe la retpoŝtadreso: LaRiverego@esperanto.nu aŭ voki nin al (514) 272-0151.

Ekzemplo:

LAPOINTE, Jessy. (1977) Por korespondado kun gejunuloj, gajulo@hotmail.com.
(Sed ne estas vera: mi ne havas la tempon!)

La Riverego. 8